

## Marita Kruijswijk: Frisa muziko en antaŭaj jarcentoj

El la 12-a jarcento konserviĝis frisaj leĝotekstoj, kiujn siatempe recitis duonkante-duondeklame oficistoj kies titolo estis *asega* aŭ "leĝo-proklamisto". Pro tio oni nomas ĉi tiujn tekstojn la **Asega-tekstoj**. Bedaŭrinde ni ne scias, kiel precize sonis la recitado.

Ekzistas diversaj versioj de la tekstoj – inter ili estas manuskriptoj el la regiono Fivelgo (apud la urbo Appingedam) kaj el Orienta Frislando (nun parto de Germanio). La teksto kiun Kapriol! uzas sur la kd titoliĝas **'t Kijnd** ("La infano"); ĝi temas pri la tiel nomata "tria malfeliĉo" kaj originas el la manuskripto de Fivelgo. Speciala trajto de ĉi tiu leĝoteksto estas la tre viveca kaj emocia priskribo de la situacio en kiu troviĝas senpatra infano.

En la frua Mezepoko, la *asega* estis oficiala jura konsilanto de la kortumo en nord-orienta Frislando. Ĉi tiu oficisto, malkiel modernaj juĝistoj, kutime juĝis nur pri la juro, sed ne pri la faktoj. La "ĉirkaŭstarantaro" (la ĵurio de la kortumo) rajtis decidi alie ol la *asega*, kaj tiam la decido de la ĉirkaŭstarantaro havis prioritaton super tiu de la *asega*. Detalaj informoj pri la Asega-tekstoj troveblas en libro el 2007 de d-ro Oebele Vries (siatempe kunlaboranto de la Frisa Instituto ĉe la Universitato de Groningeno). Dum la Mezepoko la ofico de *asega* iom post iom superfluigis kaj fine malaperis. En Frislando la distriktestroj transprenis la funkcion de la *asega* kaj de tiam ankaŭ prezidis la kortumojn.



Ĝis la fino de la 15-a jarcento la frisoj sukcesis konservi sian sendependecon. La plej antikva kantoteksto en la frisa lingvo temas pri la glora libereca batalo de la frisoj kontraŭ la saksoj ĉirkaŭ la jaro 800. Ĉi tiu kanto, kies komenca verso tekstas **Thit was to there stunde** ("Estis en la tempo"), ampleksas 30 strofojn kaj estis registrita en la 13-a jarcento en la tiel nomata Hunsingo-kodekso sur paĝoj 82-86, sed bedaŭrinde sen muzikaj signoj.

La kompleta teksto kun nederlandlingva traduko troveblas en interreto.

Vidu: [http://www.bouwebrouwer.nl/oudfries\\_recht/fon\\_alra\\_fresena\\_fridome.html](http://www.bouwebrouwer.nl/oudfries_recht/fon_alra_fresena_fridome.html)

En 1498 duko Albreĥto de Saksio iĝis reĝo super la frisoj, kiuj sekve perdis sian sendependecon. Ekde tiam la frisa lingvo pli kaj pli retiriĝis al la kamparo, kaj en la frisaj urboj la nederlanda lingvo pligrandigadis sian influon. Nur malofte oni skribis en la frisa lingvo. Tio ŝanĝiĝis kiam en 1581 Filipo la Dua estis eksigita kiel monarko de la Sep Unuiĝintaj Provincoj, post longa batalo pri la suvereneco; Frislando iĝis potenca elemento de tiu regno, kun sia propra provincestro (ekde 1584) kaj sia propra akademio (ekde 1585). De post tiu periodo disvolviĝis forta frisa nacia sento, precipe inter la pli kleraj urbanoj.

Ekzemple, en Leeuwarden ekzistis la muzika instituto *Collegium Musicorum*, kiun gvidis la komponisto kaj muzik-instruisto **Jacques Vredeman de Vries** (1558-1621). Li kompilis la libron **Musica Miscella** kun kvar- kaj kvinvoĉaj kantoj, inter kiuj estas ne nur italaj madrigaloj kaj francaj kantoj, sed ankaŭ dek unu frisaj "vilaneloj". Ĉi-lastaj estis frislingvaj, malpudoraj kantoj laŭ tekstoj de



nekonata poeto. La kantaron presis en 1602 la akademia presisto Gillis van de Rade en la urbo Franeker. La originalo nun konserviĝas en la Nederlanda Muzika Instituto en Hago.


La dek unu frisaj kantotekstoj (tradukitaj al la nuna frisa lingvo) troviĝas en interreto:

<http://www.ensafh.nl/?tag=vredeman-giacomo>

Unu el ĉi tiuj frisaj vilaneloj aŭdeblas sur la kd de Kapriol'!, nome **Sil ik dy ris** ("Mi vin...").



Plia grava kultura figuro en Frislando estis la poeto **Jan Jansz. Starter** (ĉ. 1594-1626). Li naskiĝis en Amsterdamo, pasigis sian junaĝon en la frisa urbo Harlingen, kaj de 1612 ĝis 1614 denove loĝis en Amsterdamo, kie interalie



li kunlaboris kun la fama aŭtoro Bredero. Komence de 1614 li revenis al Frislando kaj establiĝis kiel librovendisto en Leeuwarden, kie li aktivis en la literatura societo. En 1621 li aperigis poemaron kun melodiaj indikoj kiu titoliĝis **Friesche Lusthof** ("Frisa Edeno"); ĝi represiĝis poste almenaŭ kvinfoje. Ĝia elstara trajto estas la internacieco de la melodia materialo. Krom multaj nederlandlingvaj tekstoj, la kantaro enhavis ankaŭ du pastorecajn frisingvajn tekstojn. Unu el ili aŭdeblas sur la kd de

Kapriol'!, nome **Fryske Pastorel 'Jetske'** ("Frisa pastoralo 'Jetske'") laŭ la origine franca melodio La Dolphine.




En la 17-a jarcento la plej produktema aŭtoro de frisaj kantotekstoj estis sendube la poeto **Gysbert Japicx** (1603-1666). Li originis el la urbo Bolsward kaj iĝis instruisto, unue en la vilaĝo Witmarsum kaj ekde 1637 ĝis sia forpaso ĉe porknaba lernejo en Bolsward. Li flegis kontaktojn kun holandaj kaj anglaj verkistoj kaj kleruloj. Krome li estis kantoro en la Martini-preĝejo en Bolsward. En 1666 li mortis pro pesto, samkiel liaj edzino kaj filo.

Liaj junaĝaj lingvoj estis la urba frisa de Bolsward kaj la nederlanda. Komence li verkis poezion nur en la nederlanda, sed en 1639 aperis lia unua frislingva poemo. Ĝi estis nuptokanto, plej verŝajne farita laŭpete, titolita **De Friesche Tjerne** ("La frisa buterfarilo"). Ĉi tiu eldono montriĝis ege sukcesa, kaj de tiam Japicx versis ekskluzive en la frisa. Tiamaniere li evoluigis novan frisan kulturlingvon, post la malapero de la malnovfrisa lingva tradicio.

*Japicx el 1637.*

Inter liaj plej elstaraj kaj famaj kantotekstoj estas **See-aengst** ("Mara timo"), kiu aŭskulteblas sur la kd de Kapriol! Ĝi priskribas la maltrankvilecon de maljunulino, kies nepo estas irona sur la maron. Pliaj kantoj de Japicx sur la kd de Kapriol! estas: **Free-Bea** ("Petego por paco"), **Pales** (nomo de diino) kaj **Jaan is leafde** ("Donaci estas amo"). Ĉirkaŭ 1663 Japicx jam estis pretiganta eldonon de sia plena frislingva verkaro, titolita **Friesche Rymlerye** ("Frisa rimafaro"), kiu konsistis el ampoemoj, kantoj, psalmoj, poemoj por specialaj okazoj kaj pastoraloj. Plej ofte li akompanigis siajn tekstojn per melodiaj indikoj. Same kiel Starter, li evidente konis bone la francajn kaj italajn 'furorkantojn' de sia epoko, kaj avide utiligis ilin. En 1668, du jarojn post lia morto, parenco de Japicx aperigis lian verkaron en malgranda eldonkvanto por distribuado inter liaj amikoj. Ĝi formis la bazon por pliampleksigita dua eldono en 1681, kiun prizorgis Simon Abbes Gabbema, poeto kaj amiko de Japicx, kaj por posta reldono en 1684.



Ekde 1627 oni eldonadis **almanakojn** en Frislando. Komence ili estis plejparte en la nederlanda, tamen ili enhavis ankaŭ frislingvajn tekstojn. Ekzemple, tre popularis la frislingvaj dialogoj kiujn verkis ekde 1710 la lerneja instruisto Douwe Simonides, kun vulgara humuro pri ŝipistoj, kamparanoj kaj kamparaninoj. Ankaŭ frislingvaj versaĵoj aperis en la frisaj almanakoj. Sur la kd de Kapriol! troviĝas ekzemplo, nome **De Lêste Skaef** ("La lasta garbo") pri la festo kiu okazas sur la bieno post kiam oni enportis la lastan garbon en la grenejon. La anonima teksto estis kantata laŭ melodio de kanto pri amikeco de Lucas Pater. La teksto aperis en plene frislingva almanako por la jaro 1778, eldonita en Leeuwarden la jaron antaŭe. Tiu almanako grandparte perdiĝis, sed la versaĵoj kiujn ĝi enhavis, konserviĝis en reklama anonco de la almanako.

El la 19-a jarcento restas, krom kantaroj, ankaŭ du **frisaj muzikistaj manuskriptoj** kun dancomelodioj.

La pli aĝa el tiuj manuskriptoj estis verkita de **Wieger Michiels Visser** (1801-1886) el la vilaĝo Oosterzee. Profesie li estis ne muzikisto, sed bonhava barkisto. Eble li notis la melodiojn ne nur por propra uzo, sed ankaŭ por pludoni ilin al junaj muzikistoj.

La manuskripto enhavas 101 melodiojn, kiuj dividiĝas en suitoj de ĉ. 7 dancoj, ĉefe por unu violono kaj kelkfoje por du violonoj. Visser registris la suitojn en tri diversaj jaroj, nome 1817, 1819 kaj 1821. La suitoj el 1817 ampleksas diversstilajn dancojn: menuetojn, slejverojn, germandancojn, anglodancojn, valcon, kampandancon kaj serion da marŝoj. La suitoj el 1819 enhavas anglodancojn, valcojn kaj germandancon, sed ankaŭ madlotojn, vid-al-vidajn dancojn kaj skotodancojn.

Sur la kd de Kapriol! aŭskulteblas tri madlotoj, nome sinsekve **Madloto 74, 75 kaj 49**. Ankaŭ troviĝas la melodio **Trouwen** ("Nupto", Visser n-ro 51) sub la titolo **Bruidsdans** ("Nupta danco").

La **Fiŝista Skotodanco** (Visser n-ro 61), plenumata per tirsako, aŭskulteblas rete ĉe: [https://www.youtube.com/watch?v=YFz\\_WdB7jng](https://www.youtube.com/watch?v=YFz_WdB7jng).

La Madloto (Visser n-ro 81) estas la unua melodio en la registraĵo <https://www.youtube.com/watch?v=oGAgcsJnqTk>. Prezentas ĝin la folkloro muzikgrupo Pikel, interalie per sakŝalmo.

La suitoj registritaj en 1821 amplekas, krom la supre menciitaj dancoj, ankaŭ du ĵigojn.

Iuj melodioj havas similecojn kun melodioj el pli fruaj holandaj muziklibretoj, ekzemple la Malnovaj kaj Novaj Holandaj Kamparanaj Kantoj kaj Vid-al-vidaj Dancoj (Amsterdamo, 1700-1716), la Holanda Teatro (Amsterdamo, 1696-1716), la Nova Holanda Teatro (Amsterdam, 1770) kaj la Muzika Libro de J. Hanekuijk (1702-1703).

Krome la repertuaro de Visser multilate similas al dancomelodioj el aliaj eŭropaj landoj. Tiu parenceco estas okulfrapa trajto, kaj verŝajne ŝuldiĝas al la intensaj komercaj kontaktoj inter Frislando (eble ankaŭ Visser mem) kaj eksterlando. Ekzemple, la madlotoj kaj ĵigoj havas la saman strukturon kiel la irlandaj ĵigoj kaj la skotaj kornotubaj dancoj; ĉi tiujn dancojn ofte plenumis ekskluzive vira dancantaro. La nomo "madloto" kredeble devenas de la franca vorto *matelos*, kiu signifas "matroso"; oni supozas ke madlotoj estis dancoj kiujn matrosoj povis danci sur la ferdeko. La germandancoj, slejveroj kaj valcoj estas parencaj al samnomaj dancoj el Germanio. Kaj la menuetoj, vid-al-vidaj dancoj kaj anglodancoj parencas al samnomaj dancoj el Francio.



La originalo de la Visser-a manuskripto troviĝas en Tresoar, la Frisa Historia kaj Beletra Centro, en Leeuwarden (muzeaĵo 1400). En 1983, 1992 en 2007 la Frislanda Fondaĵo por Popola Muziko aperigis reeldonojn, kiujn prizorgis Judica Lookman kaj Bert Lotz.

La alia frisa muzikista manuskripto kiu konserviĝis ĝis la nuna tempo devenas de **Andries Kiers** (1851- ?). Li naskiĝis en la vilaĝo Noordwolde kiel filo de trinkejstro. Male al Visser, Kiers tute ne estis bonhava. Kiel dek-kelk-jarulo li translokiĝis al Wolvega, kaj poste al Leeuwarden, kie li estis servisto en barona domo. Li iom ĉirkaŭvadis laborante kiel ĉarpentisto, kaj en 1877 iĝis stal-laboristo en la regiono Opsterland. Inter 1877 kaj 1898 li estis plurfoje kondamnita je punlaboro pro vagabondado kaj almozpetado. En 1898 li formigris al la ĉirkaŭaĵo de Essen en Germanio. Post tio jam neniu plu aŭdis de li.

Sur la titolpaĝo de lia manuskripto estas skribite: **Muzika libro de Andries Kiers, ricevita la 20-an de novembro 1864**. Tiudate Kiers aĝis nur 13 jarojn! Tamen la manuskripto aspektas kiel verko de sperta muzikisto, do ekzistas du eblecoj: aŭ li akiris la muziklibron de pli aĝa muzikisto, aŭ li ekhavis ĝin kiel malplenan kajeron, kiun li poste mem plenigis. La repertuaro de Kiers, pli ol tiu de Visser, konsistas precipe el melodioj kiuj estis popularaj en lia epoko kaj kiujn li konis el buŝa tradicio.

La muziklibro enhavas 70 dancomelodiojn, dividitajn en suitoj de ĉirkaŭ 5 dancoj por unu violono. La dancoj kiuj aperas en ĉi tiuj suitoj estas: kvadrilo, valco, korntuba danco, skotodanco, menueto, marŝo, hopzo, germandanco, polko, galopo kaj mazurko. La unua suito estas la plej tradicia.

Sur la kd de Kapriol! troviĝas du skotodancoj en la ero **Brandewyn** ("Brando"), nome **Brandewijn met suiker** ("Brando kun sukero", n-ro 36) kaj **'t Zal wel gaan** ("Ĝi estos en ordo", n-ro 40). Plia skotodanco (n-ro 12), plenumita de Kapriol!, aŭdeblas ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=cdazRq4oBvQ&list=UUePCsj2Ln72s7jsKH0x0czXg>

Ankaŭ en la jena video oni aŭdas skotodancon (n-ro 18), kiun prezentas Robert Tromp per tirsako:

<https://www.youtube.com/watch?v=SDvsUkYNtKg>.

Ambaŭ manuskriptoj, de Visser kaj de Kiers, estas verkitaj por unu aŭ du violonoj. El tio konkludeblas ke en ilia tempo dancmuziko estis ludata plejofte per violono. Tion montras ankaŭ priskriboj de dancofestoj el la 19-a jarcento. Nur poste, en la 20-a jarcento, oni komencis uzis ankaŭ la akordionon.

Male al Visser, Kiers ne prezentas la skotodancon kiel ĝeneralan kategorion de diversaj dancoj de elegantuloj kaj urbanoj; ĉe Kiers, ĝi estas danco kiu originis el skotaj dancoj kaj evoluis al tipe frisa danco, nome la Skota Tri-takto kaj poste la Skota Kvar-takto. La ceteraj dancoj de Kiers, same kiel tiuj de Visser, havas similecojn kun eksterlandaj dancoj, precipe el Germanio.



La originalo de la Kiers-a manuskripto troviĝas en Tresoar, la Frisa Historia kaj Beletra Centro, en Leeuwarden (muzeaĵo 709). La tuto konsulteblas ankaŭ en cifereca formo (sub la nomo Muziekboek Andries Kiers) ĉe: <http://digicollectie.tresoar.nl>

En 1978 aperis reeldono de la du manuskriptoj, kun anglalingvaj klarigoj de Joan Rimmer. Tiu eldono titoliĝas **Two dance collections from Friesland** ("Du dancaroj el Frislando") kaj publikigis ĝin la Frisa Instituto ĉe la Universitato de Groningeno. Ankaŭ la Frislanda Fondaĵo por Popola Muziko prizorgis reeldonon en 1999: **Andries Kiers Zijn**

**Muzik Boek: Friese dansmuziek uit 1800** ("Muziklibro de Andries Kiers: frisa dancmuziko el 1800"). En tiu verko la muziko estas aranĝita por duvica akordiono. Preparis ĝin Anneke Goudkuil.

Dum la epoko de romantikismo, en la 19-a jarcento, fortiĝis la frisa nacia konscio, en kiu ankaŭ la frisa lingvo okupis gravan lokon. Gravaj reprezentantoj de tiu skolo estis la fratoj **Joast Hiddes** (1789-1869) kaj **Eeltsje Hiddes Halbertsma** (1797-1858). Ilia ampleksa verkaro eldoniĝis en 1871 sub la titolo **Rimen en Teltsjes** ("Poemoj kaj rakontoj"). Unu el tiuj poemoj nomiĝas **In nij liet op Grouster merke** ("Nova kanto en la foiro de l' vilaĝo Grou"). Oni kantis ĉi tiun tekston je la melodio de 'Het zal wel gaan' (Skotodanco n-ro 40 el la muzikista manuskripto de Andies Kiers, 1864), kaj tiel ĝi aŭskulteblas ankaŭ sur la kd de Kapriol! en la ero **Brandewyn**.

Eeltsje Halbertsma verkis ankaŭ la tekston de la kanto **De âlde Friezen** ("La antikvaj frisoj"), por kiu li pruntis germanevenan melodion. Ekde 1875 ĉi tiu kanto iĝis la oficiala frisa himno. En 1876 pli konciza versio estis publikigita de Jacobus van Loon en **It Lieteboek** ("La kantaro"). La teksto kun nederlandlingva klarigo troviĝas ĉe: [http://nl.wikipedia.org/wiki/Fries\\_volkslied](http://nl.wikipedia.org/wiki/Fries_volkslied)



En la 19-a jarcento la plej konata aŭtoro pri la frisa kulturo estis **Waling Dykstra** (1821-1914). La fratoj Halbertsma plej multe inspiris lin al verkado de frisaj popolaj rakontoj kaj poemoj. Komence Dykstra estis bakisto kaj komercisto, sed ekloĝinte en la urbo Franeker en 1855, li sukcesis vivteni sin ekskluzive per sia laboro ĉe tiea librovendisto/eldonisto, per verkado kaj per prelegado. En 1861 li mem establiĝis kiel librovendisto en la vilaĝo Holwerd. En 1885 oni komisiis al li la finredaktadon de la granda Frisa Vortaro. Krome li verkis interalie la libron 'El la frisa popola vivo de antaŭe kaj poste', kiu aperis en du volumoj en 1892 kaj 1896. La verko priskribas diversajn popolajn kutimojn, ekzemple kiel oni festis kamparanan nupton. Paĝo 212 tekstas resume:

Iumomente la junuloj iras al la draŝejo en la ŝedo. Du violonistoj jam eksidis sur seĝoj kiujn oni metis sur trogon. Kaj tiam oni ekdancas la Skotan Tri-takton...



Lia unua kantaro, titolita '**Doaitse mei de Noardske Balke**' ("Doaitse kun la norda trabo\*"), estis eldonita en Franeker en 1848. Mankas en ĝi muziknotoj, sed la tekstojn tamen akompanas indikoj pri la melodioj. Nur ekde la 4-a eldono en 1897, Christoffel Koster provizis la kantojn per muziknotoj.

Post ĉi tiu unua kantaro Waling Dykstra, kunlabore kun Tjibbe Gearts, prizorgis ankaŭ verkon titolitan **In doaze fol âlde snypsnaren** ("Skatolo plena de malnovaj juveletoj"). Ĝi aperis en 1856 kaj enhavas malnovajn rimaĵojn, proverbojn kaj kelkajn kantojn (sen muziknotoj). En 1874 Dykstra publikigis la kanton **Friske Sang** ("Frisa kantado") kun kantoj kies tekstojn li mem verkis, aranĝitaj duvoĉe laŭ konataj popolaj melodioj. La plej konata estas **Wat bistû leaflik, rizende simmermoarn** ("Kiel ĉarma vi estas, leviĝanta somera suno"). La frislingva teksto kaj nederlanda traduko

de ĉi tiu kanto troveblas ĉe: [http://www.bouwebrouwer.nl/gedichten/wat\\_bistu\\_leaflik.html](http://www.bouwebrouwer.nl/gedichten/wat_bistu_leaflik.html)

Tradicia versio de la kanto, plenumata de koruso Friese Skotsploeg Krite Ljouwert, aŭskulteblas ĉe: <http://www.liederenbank.nl/sound.php?recordid=70677>

La teksto kaj moderna plenumo fare de Piter Wilkens troviĝas ĉe:

[http://www.walingdijkstra.nl/Waling\\_Dijkstra/Simmermoarn.html](http://www.walingdijkstra.nl/Waling_Dijkstra/Simmermoarn.html)

Plia kanto el ĉi tiu kantaro aŭdeblas sur la kd de Kapriol!. Temas pri **Pas op!** ("Atentu"), laŭ melodio de konata nederlanda popolkanto.

\* *nomo de muzikilo*



La **Norda trabo** estas muzikilo kiu iam estis tre populara en Frislando. Ĝi konsistas el ligna sonkesto sur kiu streĉiĝas 4 aŭ 5 kordoj. Oni ludas la melodion sur la antaŭaj du kordoj. La ceteraj kordoj estas agorditaj kvinte kaj servas kiel bordunoj. Iuj el la instrumentoj estis diatonaj, aliaj estis kromataj. Ekde la malfrua Mezepoko la norda trabo estis konata en la marbordaj regionoj de la Norda Maro kaj Balta Maro, kaj poste ĝi disvastiĝis al multaj aliaj landoj, kie oni uzis por ĝi multajn diversajn nomojn. La plej malnova skriba mencio troviĝas en la libro *Syntagma Musicum* de

Praetorius (1619). Ofte oni kuŝigis la instrumenton sur (kuireja) tablo por ludi ĝin fingre, eventuale pasigante bastoneton sur la transversaj trabetoj. Aŭ oni tenis la instrumenton tiel, ke eblis bati la kordojn per bastono aŭ froti ilin per arĉo. Ĉirkaŭ 1800 la uzado de la norda trabo malaperis en Frislando. Tamen, ĉirkaŭ 1975 la intereso pri folkloro muziko reviviĝis kaj de post tiam oni denove konstruas kaj ludas ĉi tiun instrumenton.

La kantarojn de Waling Dykstra sekvis multaj aliaj kantaroj kiuj estis tre konataj kaj popularaj en Frislando. Nome:

- **It Lieteboek** ("La kantaro" - 1876), kiun kompilis Jacobus van Loon kaj Martinus de Boer. Ĝi enhavas 83 kvarvoĉajn kantojn kun piana akompano. Kelkaj el ili havas tekstojn de Eeltsje Halbertsma, Waling Dykstra, Piter Jelles Troelstra kaj la kompilinto Jacobus van Loon. Iuj el la melodioj estas nederlandaj kaj germanaj popolaj melodioj konataj en la 19-a jarcento, aliaj estas novkomponitaj melodioj, ĉefe de Martinus de Boer.

- Dua eldono de It Lieteboek aperis en 1899 sub la titolo **Frysk Lieteboek** ("Frisa kantaro"). Kompilis ĝin W. Faber kaj T.E. Halbertsma. Kelkaj novaj kantoj estis aldonitaj al ĝi. Samtitolaj 3-a kaj 4-a eldonoj aperis en 1914 kaj 1930. Ambaŭ estis kompilitaj de W. Faber, S.L. Van der Burg kaj Y. Nieuwenhuis.



- **Nij Frysk Lieteboek** ("Nova frisa kantaro") kun 61 kantoj, kompilita de Piter Jelles Troelstra kaj P. H. de Groot (unua eldono en 1886). Ĝi enhavas ne nur kantotekstojn de multaj frisaj poetoj el la 19-a jarcento, sed ankaŭ kelkajn de la poeto Gysbert Japicx, kiu vivis en la 17-a jarcento. La muziko (kun piana akompano) inkluzivas popolajn melodiojn el diversaj eŭropaj landoj kiel ankaŭ novkomponitajn melodiojn de P. H. de Groot kaj de aliaj (parte klasikaj) 19a-jarcentaj komponistoj. La unuan eldonon sekvis pluraj represoj, nome en 1904, 1916 kaj 1922 (kun 66 kantoj). La plej konataj kantoj el ĉi tiu kantaro estas **Grouster weagen** ("Ondoj de l' vilaĝo Grou" – teksto de E. Halbertsma kaj muziko de P.J. Troelstra) kaj **It Heitelân** ("La patrujo" – teksto de J.L. v.d. Burg kaj muziko de J. Lindeman). Oni rigardas ĉi-lastan kanton kiel la duan nacian himnon de Frislando.

- **Fryke Sangen** ("Frisaj kantoj"), kiun kompilis Roelof Jan Sipkens en 1935. Ĝi enhavas 34 kantojn por lerneja uzado.

- En 1936 eldoniĝis libro kun tradiciaj porinfanaj kantoj el tuta Nederlando, inter kiuj pluraj en la frisa lingvo. La libro titoliĝas 'La ludo de patrino kaj infano: malnovaj infanrimaĵoj por novaj gepatroj'. Kompilis ĝin Sjoukje M. D. Troelstra-Bokma de Boer, kiu estis la edzino de P. J. Troelstra, kaj Jop Pollmann. Unu el la frisaj porinfanaj kantoj, nome **Hop, hop, hynke** ("Hop, hop, ĉevaleto") aŭskulteblas sur la kd de Kapriol! sub la titolo **Hynste Polka**.

- En 1943, do meze de la dua mondmilito, aperis la unua eldono de la kantaro **Fryslân sjongt** ("Frislando kantas"), kompilita de H. K. Schippers, J. Slofstra kaj W. Zonderland. Ĉe la kantoj presiĝis muziknotoj, sed mankis piana akompano. En la verko kolektiĝis la plej konataj kantoj el la supremenciitaj 'It Frysk Lieteboek' kaj 'Ny Frysk Lieteboek', kaj krome 45 novefaritaj kantoj: entute 117 kantoj. Ĉi tiu kantaro rapide populariĝis, kaj sekvis multaj novaj versioj, kiujn ĉiam redaktis la Muzikologia Laborgrupo de la Frisa Akademio. Plurfoje, precipe en la 5-a kaj 7-a eldonoj, la enhavo de 'Fryslân sjongt' estis reviziita kaj pliampleksigita. En 1993 aperis nova eldono sub la titolo **Fryslân sjongt en spilet** ("Frislando kantas kaj muzikas"). Ĉi tiu versio inkluzivas pianan akompanon; granda parto de ĝi estis transprenita el 'It Frysk Lieteboek', la cetera parto estis nove komponita de K. T. de Jong kaj Bernard Smilde.

La 11-a kaj lasta eldono de 'Fryslân sjongt' datiĝas el 2000.

La tekston tradukis el la nederlanda al Esperanto: Arjen-Sjoerd de Vries